

LA TRI DEMANDOJ DE LA SFINKSO: DE KIE? KIEL? KIEN?

4.1 *La triunuo de la ekzistado*

¹El sciteoria vidpunkto ĉio estas unuavice tio, kio ĝi ŝajnas esti, sed krom tio ĉiam io tute alia kaj senkompare pli vasta.

²La triunuo de la ekzistado konsistas el tri egalvaloraj aspektoj: materio, movado kaj konscio. Neniu el tiuj tri povas ekzisti sen la du aliaj. Ĉia materio moviĝas kaj havas konscion. La konscio estas aŭ potenciala (nekonscia) aŭ aktualigita, pasiva (neaktiva) aŭ aktiva.

4.2 *La kosmo*

¹Laŭ la esotera hilozoiko (la doktrino de Pitagoro) la pramaterio estas la nelimigita spaco kaj enhavas la neelĉerpeblan provizon de nekonsciaj praatomoj. En tiu pramaterio estas spaco por nelimigita nombro de globoj. Nia kosmo estas tia globo.

²La kosmo estas kunmetita el praatomoj (monadoj), kiuj estas la plejeble malgrandaj eroj de la pramaterio kaj la plejeble malgrandaj firmaj punktoj por individua konscio. La praatomoj konsistigas kontinuan serion de ĉiam pli malsubtilaj agregiĝostatoj, de ĉiam pli malsubtilaj specoj de materio.

³La kosmo estas perfekta organizaĵo kaj konsistas el longa serio da interpenetraj materiaj mondoj de malsamaj gradoj de denseco. La videbla, fizika mondo estas la plej malalta, tiu de la plej malsubtila materio. Pli altaj mondoj troviĝas en ĉiuj pli malaltaj. En la fizika mondo do ekzistas la tuta serio da atomaj mondoj. La materio de ĉiu pli malalta mondo estas kunmetita el ĉiam pli multaj praatomoj.

4.3 *La involuado*

¹La mondoj estas elkonstruitaj de supre, de la plej alta mondo. La praatomoj involviĝas, fariĝante ĉiam pli malsubtilaj atomspecoj en ĉiu pli malalta mondo. Ĉiuj tiurilataj involvo-procesoj nomiĝas per komuna termino la involuado.

²Ĉiu mondo havas sian propran specon de "spaco" (dimensio), de "tempo" (kontinueco, daŭro), de atommaterio kaj de agregaĵoj kunmetitaj el tio, de movado (forto, energio, vibrado, "volo") kaj de konscio. "Preter spaco kaj tempo" sekve estas la pramaterio.

4.4 *La vivoformoj*

¹Ĉiu vivaĵo havas formon, de atomo, molekulo, agregaĵo, al planedo, sunsistemo kaj kosmaj mondoj. Tiuj formoj submetiĝas al la leĝo de transformado, aliiĝas senĉese, disiĝas kaj reformiĝas. La monadoj (praatomoj) formas (vidate ekde la fizika) supreniran serion da ĉiam pli altaj vivoformoj, en kiu la pli malaltaj enestas en la pli altaj kaj konsistigas kovrilojn por ili. La tuta kosmo formas serion da ĉiam pli subtiligitaj vivoformoj, servantaj por doni, ŝtupon post ŝtupo, al la monada konscio tiun "organon", kiun ĝi bezonas por sia plua evoluado.

²La monadoj estas la solaj nedetruiblaĵoj en la universo. Ne ekzistas "morto", nur novaj formoj por la monada konscio. Post kiam la formo estas plenuminta sian dumtempan taskon por la konscievoluado de la monado, ĝi dissolviĝas.

4.5 *La evoluado*

¹La involuado implicas involvon de la monadoj al la plej malalta kosma mondo, la evoluado ilian reiron al la plej alta kosma mondo. Ĉe tio ili akiras en la plej malalta mondo plenan aktivan memkonscion, kaj poste ĉioscion kaj ĉiopovon en ĉiam pli altaj mondoj. La evoluado do konsistas en serio da ĉiam pli altaj naturregnoj, da ĉiam pli altaj evolustadioj. Ĉiu monado

troviĝas ie en tiu ĉi vastega evoluskalo; kie, dependas de ĝia aĝo: la tempopunkto de ĝia eniĝo en la kosmon el la pramaterio kaj de ĝia transiro de pli malalta al pli alta naturregno.

²La evoluado estas dividita en kvin naturregnoj kaj sep diregnojn. La planedaj mondoj enhavas la naturregnoj, la sunsistemaj mondoj la plej malaltan diregnon kaj la kosmaj mondoj la sekvajn ses diregnojn.

³La homaro, ĝis nun esplorinte ĉirkaŭ miliononon da la realo, en la fizika mondo povas esplori ĉirkaŭ unu procenton da la tuta ekzistado. La monado en la kvina naturregno povas konscii pri ĉirkaŭ 10 procentoj, kiel diulo en la plej malalta diregno ĉirkaŭ 14, en la dua 28, en la tria 42, en la kvara 56, en la kvina 70, en la sesa 85 kaj en la plej alta diregno pri 100 procentoj. Ĉia scio pri la realo estas aŭtoritata tra la tuta serio da monadoj en ĉiam pli altaj mondoj, ĝis la individuo povas per sia propra travivaĵo havigi al si la bezonatan senperan scion.

⁴Antaŭ ol la monado estas atinginta la plej altan diregnon, ĝi diferencigas inter dio imanenta kaj dio transcenda. La imanenta diularo ĉiam konscias pri sia unueco kun ĉiu vivaĵo. La superkonscio apartenas al la transcenda diularo.

⁵Kiam sufiĉa nombro de monadoj sukcesis tralabori la vojon de la plej malalta naturregno al la plej alta diregno, tiam ĉi tiu kolektiva vivaĵo povas eliri el sia kosma globo komenconte konstrui en la pramaterio propran kosman globon per praatomoj alportitaj el la neelĉerpebla provizo de la pramaterio.

4.6 *La proceso de manifestiĝo*

¹La tuta kosmo konsistigas unu solan kontinuan proceson de manifestiĝo, en kiu partoprenas kun siaj konsciesprimoj ĉiuj monadoj, nekonscie aŭ konscie, nevole aŭ vole. Ju pli alta mondo kaj regno, ju pli alta speco de konscio, des pli granda estas la kontribuo de la monado al la proceso de manifestiĝo.

²Kiam la monado estas trapasinta la involuadon kaj evoluadon de la manifestiĝoproceso, akirinta kaj demetinta kovrilon en mondo post mondo, kaj fine en la plej alta kosma mondo estas liberiginta sin de la involvado en la materion, tiam ĝi ekkonscias pri si mem kiel monado. Ĝis tiam ĝi identigas sin kun iu el tiuj kovriiloj, kiujn ĝi akiris kaj aktivigis unu post la alia.

4.7 *La konscio*

¹La konscio estas unu. La tuta kosmo konsistigas unu solan totalan konscion, en kiu ĉiu monado havas neperdeblan parton. La universala konscio estas kvazaŭ sumiĝo de la konscio de ĉiuj monadoj, same kiel la oceano estas unuaĵo de ĉiuj akveroj. Ĉia konscio sekve estas laŭnature kaj kolektiva kaj individua, kvankam la normalulo ne povas percepti tion per siaj ekstreme limigitaj rimedoj.

²Ekzistas tiom da diversaj specoj de konscio kiom da specoj de materio. Ĉiu mondo havas sian propran totalan konscion, same kiel ĉiu monada kovrilo havas sian. Ĉiu pli alta mondo prezentas, kompare kun ĉiu pli malalta, grandegan plialtiĝon, kiel intensece tiel ankaŭ vastece, rilate energion kaj konscion. La monada konscio havas en ĉiu mondo tute malsaman perceptadon de la realo. Estis tio, kio origine intenciĝis per la diro, ke ĉia percepto de realo estas majao aŭ "iluzio", ĉar konscio valida por ĉiuj ĉie ne ekzistas pli frue ol en la plej alta kosma mondo.

³Ĉiu mondo, ĉiu planedo, sunsistemo kaj tiel plu do havas sian propran kolektivian konscion kaj formas integran kolektivian vivaĵon kun unu monado kiel la plej alta superreganto. Ju pli altan regnon estas atinginta la monado, des pli vasta estas ĝia partopreno en la kosma totala konscio. Kiam la monado estas akirinta planedan konscion, ĝi estas planeda vivaĵo. Kiam fine ĝi estas aktualiginta sian potencialan universalan konscion, ĝi estas fariĝinta individua unuaĵo en la kosma ĉioscio kaj ĉiopovo. Ĝis tiam ĝi estis la plej evoluinta monado en tiu ĉiam pli vasta materia agregaĵo, kiun ĝi povis rigardi kiel sian propran kovrilon. En ĉiu mondo ĝi sin vestas per kovrilo el la materio de tiu mondo, kiu kovrilo etendiĝas ĉiam pli.

⁴La monado estas nedetruenda individua konscio, kiu estas dekomence potenciala (ne-

konscia), en la plej malalta naturregno (la fizika minerala regno) de la plej malalta mondo estas vekita en aktivan konscion kaj poste akiras laŭgrade konscion en ĉiam pli altaj mondoj. Nur la plej malsubtila materio faras sufiĉan rezistadon por ke la subjektiva monada konscio povu lerni distingi la kontraŭon de interna (subjektiva) kaj ekstera (objektiva) realo kaj akiri aktivan konscion kiel antaŭkondiĉon de memkonscio en ĉiuj specoj de realo. Poste la monado povas per memaktiveco akiri la necesajn kvalitojn kaj kapablojn en ĉiam pli altaj naturregnoj de ĉiam pli altaj mondoj.

⁵Konscio en pli malalta materispeco kaj mondo ne sekvigas konscion en aŭ pri pli alta mondo, kiu do ŝajnas neekzistanta. Ĉio por la monado pli alta apartenas al la superkonscio. La tuta pasintaĵo de la monado apartenas al ĝia subkonscio, en novaj enkarniĝoj nerekte alirebla nur kiel rememoro lige kun similspecaj spertoj.

⁶Por la monado la evoluado signifas ne nur memakiradon de ĉiam pli altaj specoj de konscio, sed ankaŭ liberiĝon de la identiĝado kun pli malaltaj specoj, kiuj ĉiam ŝajnas esti la solaj scieblaj kaj certaj, ĉar ĝis tiam la solaj spertitaj kaj sciitaj.

⁷Same kiel pli alta speco de materio penetras pli malaltan, tiel pli alta speco de konscio perceptas ĉiujn pli malaltajn specojn.

4.8 *La naturregnoj*

¹La monada konscio "dormas" en la minerala regno, "sonĝas" en la vegetaĵa regno, vekigaŝas en la besta regno, akiras memkonscion en la homa regno kaj scion pri la ekzistado en la kvina naturregno, por poste daŭrigi sian konscievoluadon en la sep ĉiam pli altaj diregnoj, ĉe tio akirante ĉioscion kaj ĉiopovon en ĉiam pli altaj mondoj.

²La planedoj reprezentas la kvin plej malaltajn mondojn kaj la kvin naturregnoj. El tiuj kvin la minerala regno apartenas al la videbla fizika mondo. La vegetaĵa regno partoprenas ankaŭ en la fizika etera mondo, la besta regno en la emocia mondo (malĝuste nomata la astrala mondo), la homa regno en la mensa mondo kaj la kvina naturregno en la kaŭzala mondo.

³Kiam la mineralaj monadoj estas sukcesintaj akiri fizikan eteran konscion, ili transiras en la vegetaĵan regnon. La konscio dekomence esprimiĝas kiel tendenco al ripetado, kiu iĝas tendenco al kutimo organizita aŭ naturo". Kiam la konscio pliiĝas, ekestas strebado al adaptiĝo. La vegetaĵaj monadoj fariĝas bestaj monadoj per akiro de emocia konscio. Havante sufiĉe aktivan mensan konscion, la bestaj monadoj transiras al la homa regno, kaj la homo per akiro de plena konscio en sia kaŭzala kovrilo al la kvina regno.

⁴La monadojn en la minerala regno ĉirkaŭas kovrilo apartenanta al minerala grupanimo, tiujn en la vegetaĵa regno vegetaĵa grupanimo kaj tiujn en la besta regno besta grupanimo. En pli altaj mondoj la monado mem devas sin vesti per kovrilo apartenanta al la materio de la respektivaj mondoj. Kiam la besta monado estas evoluinta tiom, ke ĝi povas akiri propran kovrilon en la kaŭzala mondo, ĝi transmigras al la homa regno. Poste la monado dum sia tuta restado en la homa regno ĉiam estas enfermita en sia kaŭzala kovrilo. Oni povas diri, ke la kaŭzala kovrilo enkarniĝas, ĉirkaŭfermas kaj penetras la pli malaltajn kovrilojn. Devus esti klare el la dirita, ke neniam homo povas renaskiĝi kiel besto, same kiel besto ne povas fariĝi vegetaĵo aŭ vegetaĵo fariĝi mineralo. La transmigrado ne povas retroiri.

⁵Tute ne necesas, ke la monado evoluu per organikaj kovriloj. Verdire la plejmulto da monadoj (ekzemple tiuj, kiuj sekvas la paralelan devaan evoluadon) neniam havis aliajn korpojn ol agregaĵajn kovrilojn, konsistantajn el atomoj kaj molekuloj elektromagnete koheraj, tiaj kiajn havas la homo en ĉiuj siaj mondoj krom la videbla.

4.9 *La kovriloj kaj mondoj de la homo*

¹La monado en la homa regno dum la enkarniĝo en la fizika mondo havas je sia dispono entute kvin kovrilojn, unu kovrilon en ĉiu el la kvin plej malaltaj mondoj: organismon en la videbla fizika mondo, eteran kovrilon en la fizika etermondo, emocian kovrilon en la emocia

mondo, mensan kovrilon en la mensa mondo kaj daŭran kaŭzalan kovrilon en la kaŭzala mondo (la Platona idemondo). El tiuj kvin kovriroj la kvar pli malaltaj renoviĝas ĉe ĉiu enkarniĝo kaj diseriĝas pli-malpli rapide post kiam la monado sin liberigis de la organismo. Ĉiuj kovriroj krom la organismo estas agregaĵaj kovriroj. La etera materio ĉirkaŭfermas ĉiun unuopan ĉelon de la organismo kaj perigas tiujn diversajn funkciajn energiojn, kiujn la anktivuloj nomis forto de la vivo. La emocia, mensa kaj kaŭzala kovriroj ĉirkaŭfermas kaj penetras ĉiujn pli malaltajn. Ili estas ovoformaj kaj etendiĝas inter 30 kaj 45 centimetroj for de la organismo, konsistigante la tiel nomatan aŭron. Ĉirkaŭ 99 procentoj da la materio de tiuj kovriroj altiriĝadas al la organismo kaj kunteniĝadas interne de ĝia periferio, kaj tial tiuj kovriroj formas kompletajn kopiojn de ĝi.

4.10 *La konscio de la homo*

¹En la nuna ĝenerala evolustadio de la homaro la normalulo dum la enkarniĝo ordinare konscias objektive nur en sia organismo, subjektive en siaj etera, emocia kaj mensa kovriroj kaj nekonscias en sia kaŭzala kovrilo. La "videbla" fizika realo, ampleksanta la tri plej malaltajn fizikajn agregiĝostatojn (la solidan, likvan kaj gasan), estas la sola, kiun la homo priscias kaj opinias la sola ekzistanta. Li perceptas siajn dezirojn kaj sentojn en la emocia kovrilo kaj siajn pensojn en la mensa kovrilo kiel nurajn subjektivaĵojn, ne komprenante, ke al ĉi tiuj aĵoj respondas, el objektiva vidpunkto, vibradoj en la materispecoj de la respektivaj mondoj.

²Kiam la individuo estas akirinta objektivan konscion en ĉiuj siaj enkarniĝaj kovriroj kune kun kaŭzala intuicio kaj, per tio, konscion en sia kaŭzala kovrilo, li transiras kiel kaŭzala mio al la kvino naturregno.

³Antaŭ ol la monado estas akirinta la kapablon de daŭra kaŭzala aktiveco, ĝi devas post la fino de sia enkarniĝo atendi novan renaskiĝon, dormante en sia kaŭzala kovrilo. Ĉe tio ĝia konscikontinueco perdiĝas, kaj ĝia memoraro pri la pasinto latentigigas ĝis ĝi povos kaŭzale konscii.

⁴La nombro de enkarniĝoj en ĉiu naturregno estas nelimigita, ĝis la individuo estos akirinta la kvalitojn kaj kapablojn, kiuj estas necesaj en la respektivaj regnoj, kaj propran kovrilon en la tuj pli alta mondo. Estas konsiderende, ke restas latentaj en nova enkarniĝo ĉiuj akiritaj kvalitoj, kiuj ne denove havas okazon disvolviĝi, tamen ĉiam pli facile. Ordinare nur la kompreno estas aktuala.

4.11 *La evolustadioj de la homo; kelkaj ĝeneralaĵoj pri la evoluado*

¹Klasoj estas la natura ordo. La naturaj klasoj prezentas malsamajn aĝoklasojn, kiel en la homa regno tiel ankaŭ en ĉiuj aliaj naturregnoj, kaj pli altaj kaj pli malaltaj.

²Dum sia restado en la homa regno la individuo trairas kvin evolustadiojn: la barbaran stadion (kiel pli maltalta emocia mio), la civilizacian (pli malalta mensa mio), la kulturalan (pli alta emocia mio), la humanecan (pli alta mensa mio) kaj la idealecan (kaŭzala mio).

³La monado evoluas per la lernado el propraj spertoj kaj per la rikoltado de tio, kion ĝi jam semis en antaŭaj enkarniĝoj. Ĉio bona kaj malbona, kio trafas la individuon, estas lia propra faro. Ne povas okazi al li io, kion li ne jam meritis. Maljusto en iu ajn rilato estas nepre senekzista, kaj la parolo pri tio estas parolturno de vivnesciuloj kaj enviuloj.

⁴La evoluado ĉe monadoj de repeliĝada baza tendenco povas preni malpravan direkton, montriĝante jam per parazitismo ĉe vegetaĵoj kaj rabado ĉe bestoj. En pli malaltaj regnoj la monadoj plejparte kontraŭagas al la evoluado, kaŭzante malordon, ĉio je propra respondeco. Nekonscia, kaj en ankoraŭ pli alta grado konscia, sintrudo al la neperdebla, netuŝebla, dia libero de la monado, libero limigita de la egala rajto de ĉiu vivaĵo, rezultigas la bataladon pro la ekzisto kaj la kruelon de la vivo.

⁵La vegetaĵaj monadoj evoluadas per tio, ke la vegetaĵojn elmanĝas bestoj kaj homoj, kaj per tio submetas ilin al la fortaj vibradoj de siaj animalaj korpoj.

⁶Estas kulpo ne de la vivo, ke la individuo en pli malaltaj evolustadioj en sia preskaŭ totala

nescio priviva eraras pri preskaŭ ĉiuj naturleĝoj kaj vivleĝoj.

⁷Laŭ la fundamenta aksiomo de la esoteriko ekzistas leĝoj en ĉio kaj ĉio estas esprimo de leĝo. Kiu posedas scion pri ĉiuj leĝoj en ĉiuj mondoj, tiu estas ĉioscia. Ĉiopovo kiel ankaŭ libero estas ebla nur per nepre senerara aplikado de ĉiuj leĝoj.

* * * * *

⁸Kompreneble la esoterika mond- kaj vivrigardo neniam povos esti por la homaro alio ol labora hipotezo. Tamen ju pli la homaro evoluados, des pli evidentiĝos la nekomparebla supereco de tiu hipotezo. La kaŭzala mio kapablas konstati ĝian laŭfaktecon en la kvin mondoj de la homo.

La supra teksto estas la kvara parto el tute sep de *La scio pri la realo*, libro verkita de Henry T. Laurency. Tradukis el la sveda Lars Adelskog en 1980. Kopirajto © Eldona fondaĵo Henry T. Laurency 1980 kaj 2017. Titolo de la originalo: *Kunskapen om verkligheten*.

Lingva komento de la tradukinto: La radikoj involu- kaj involv-, aperantaj kelkfoje en la supra teksto, estas neologismoj inventitaj por respondi al terminoj uzataj en la originala sveda teksto. Ambaŭ signifas kunmetiĝon de pli alta materispeco en pli malaltan. Plej ekzaktan difinon de tiuj du terminoj, kiel ankaŭ diferencigon laŭsignifan inter ili, la leganto trovos en *La filozofa ŝtono* de Laurency, ĉapitroj 2.8 kaj 2.9.